# Raportoj
# de la ILEI-sekcioj
# pri ilia agado
# en la jaro
# 2015

### Sekcioj

**1.Albanio:** *bselimi@gmail.com*

2.**Australio:** *bishop.jennifer699@gmail.com*

**3.Belgio:** *flandrio@hotmail.be*

**4.Benino***: alofkarlo@yahoo.fr*

5.**Brazilo:** *leysester@gmail.com*

**6.Bulgario**: *maries972@yahoo.com*

**7.Burundo**: *ane_bur@yahoo.fr*

**8.C'eh'io:** *melicharkova@quick.cz*

**9.C'inio**: *arko.gong@qq.com*

**10.Danio**: *bentjensenius@gmail.com*

11.**Finnlando:** *sylvia.h@kolumbus.fi*

**12.Francio:** *michel_dechy@hotmail.com*

13.**Germanio:** *zsofia.korody@esperanto.de*

**14.Hispanio**: *eduardo.berdor@gmail.com*

15.**Hungario:** *jozefo.nemeth@gmail.com*

**16.Irano:** *mamduhi@gmail.com*

**17.Italio:** *silkovojo@aliceposta.it*

**18.Japanio:** *isksanjo@ff.e-mansion.com*

19.**Katalunio**: *ileicat@hotmail.com*

**20.Kongo DR:** *viktorlufimpu@gmail.com*

**21.Korea Resp.:** *esabpark@korea.com*

**22.Kroatio/KEL:** *mjerkovic@net.hr*

**23.Kroatio/KEU:** *ilei@hes-keu.hr*

**24.Kubo:** *info@esperanto.co.cu*

**25.Meksiko**: *ilei@esperanto-mexico.org*

**26.Mongolio:** *tserendjd@yahoo.com*

**27.Nederlando:** *moerbeekr@gmail.com*

28.**Nepalo:** *nespa_bharat@hotmail.com*

**29.Norvegio:** *akbondhus@jkn.no*

30.**Pollando:** *tchmj@wp.pl*

**31.Rumanio:** *mihaitrifoi@yahoo.com*

**32.Serbio:** Radojica :*radojica.petrovic.rs@gmail.com*

**33.Suda Afriko:** *emalandan@yahoo.fr*

34.**Svedio**: *agneta.emanuelsson@fro.se*

**35.Svislando:** *mirejo.mireille@gmail.com*

**36.Togolando:** *abiovamensah@yahoo.fr*

37.**Ukrainio:** *volodomir@ukr.net*

**38.Usono kaj Kanado:** *rglossop@mindspring.com*

39.**Vjetnamio**: *Nguyennepa9cfl@gmail.com*

**Reprezentantoj de ILEI**

**1.Armenio:** *Lidaelb@yahoo.com*

**2.Barato/Hinda Unio**: *esperovr@yahoo.co.in*

**3.Britio**: *elistaros@hotmail.com*

**4.C'ilio:** *hecg@uea.org*

**5.Ganao:** *abaako43@yahoo.com*

**6.Islando:** *lofturmsig@yahoo.de*

**7.Israelo:** *saviogp@zahav.net.il*

**8.Pakistano:** *adeelbutt84@gmail.com*

**9.Rusio**: *svsmetanina@yandex.ru*

**10.Slovakio**: *ilei.oficejo@gmail.com*

**11.Tajvano**: rezamenhof@yahoo.com

**12.Urugvajo:** *sonry@adinet.com.uy*

## Kontaktpersonoj

**1.Argentino** : *gwagner@digitaloffice.com.ar*

**2.Austrio**: *punktor@live.at*

**3.Bolivio:** *mileis_7@hotmail.com*

**4.Bosnio kaj Hercegovino:**

**5.Estonio:**

**6.Haitio:** *christinetheano@hotmail.com*

**7.Indonezio**: *ilia.dewi@gmail.com*

**8.Kenjo**: *simiyugilbert@yahoo.com*

**9.Kostariko:** Hugo *tikoguau@gmail.com*

**10.Litovio:** *grazopul@yahoo.com*

**11.Luksemburgo**: *moonmont@pt.lu*

**12.Nikaragvo** *esperantonica@gmail.com*

**13.Portugalio**: *luisladeira@portugalmail.pt*

**14.Taghikio**: *komintel@yandex.ru; aet2005@ yandex.ru*

**15.Venezuelo**: *venesperanto@cantv.net*

## ARGENTINO

Mi informas al vi ke ekde nun la nova estraro de Argentina Esperanto-Ligo estas:

Prezidanto: Jorge Montanari.

Vicprezidanto: Adrian Alejandro.

Sekretario: Ruben Sanchez.

Eta priskribo:

*Jorge Montanari:* Mi naskiĝis en Bonaero (1976) kaj esperantistiĝis en 1999. Mi estas scienca esploristo el CONICET pri nanoteknologio, kaj profesoro ĉe UNQ. Krome, mi estas hispanligva verkisto, kaj ĵurnalisto pri kino kaj sporto. Esperante, mi foje kunlaboris kiel scienca redaktoro en revuo Monato. Mi prelegis en Eŭropo kaj Argentino. En 2014 mi estis elektita kiel Rektoron de Internacia Kongresa Universitato, en kies kadro mi kondukis ĝiajn sesiojn dum la 99ªUK. Mi ankaŭ estas trejnisto kaj kreinto de Tutmonda 'Esperanto' Futbala Asocio (rekonata de internacia futbala asocio), kaj mi kondukis la futbalan Selektitaron dum la 99ª kaj la 100ª UK (en Francio). Mi vizitis 12 landojn pere de Pasporta Servo kaj gastigis gesamideanojn el la tuta mondo. En 2014 mi sukcese trapasis la KER ekzamenon (nivelo C1 kompleksa).

*Adrian Alejandro:* Mi naskiĝis la 21an de Julio 1993 kaj esperantistiĝis la 9an de Junio 2011. Mi studas medicinon ĉe la UBA. En la E-Movado, mi estas komisiito de TEJO pri kulturo, ekde septembro 2015. Mi ankaŭ estas lingvohelpanto kaj tradukanto ĉe lernu.net; mi ankaŭ estis interpretisto dum ekskursoj kaj instruisto pri la hispana lingvo, kadre de la LKK de la 99a UK. Mi faris la skriban KER ekzamenon por nivelo C1 la 9an de Junio 2012 kaj sukcese trapasis ĝin; mi estas aktiva membro de UEA/TEJO. Mi ankaŭ estis la golulo de la Esperantista Selektitaro dum la 99a kaj 100a UK. Mi ekzameniĝis por la parola parto de la KER ekzameno nivelo C1 la 2an de Aŭgusto 2014, kaj sukcese trapasis ĝin. Mi reprezentis Argentinon dum la 100a UK en Lille, aginte kiel komitatano de TEJO dum tiu semajno.

la kontaktoadreso estas info@esperantoargentina.org

Mi profitas la okazon por sciigi ke dum la pasinta Argentina Kongreso de Esperanto, Sonia Risso el Urugvajo kaj Hector Campos Grez el Cilio, kunsentis pri komuna regiona agado inter niaj landoj por kapabligi novajn kursgvidantojn kaj instruantojn. Nia regiono urg'e bezonas

kapabligan kurson. Certe ni studos la plej praktikajn kaj malmultekostajn metodojn por ricevi tiujn kursojn.

La landa reprezentanto de ILEI en Argentino, Gabriel Wagner, rezignis. Ni baldau elektos novan reprezentanton.

Amike, el la suda parto de la mondo, salutas vin.

Marcelo Daniel Lucero.

ILEI-membro en Argentino.

Eksa AEL-sekretario.

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## BRAZILO

2015-01-04

Karaj gekolegoj

Okazas multo en Brazilo lige kun Eo kaj ties instruado.

5 brazilanoj ekstudis en Poznan, komencis en 2011. 3 sukcese finis la studadon en 2014.

Aperas lernolibroj.
mi ricevis libretojn eldonitajn de via sekcio en 2009, 2010... belegaj ili estas.

Brazilo estas giganta lando kun multaj esperantistoj.

Diversaj brazilanoj abonas nian revuon Juna AMiko, do supozeble ili instruas.

Brazilanino komencis la studadon en Poznan en 2014. Eble ech aliaj, mi ne memoras ekzakte.

Fama brazilano prezidis la Akademion de Eo.

Oomoto floras en Brazilo

Brazilaj delegitoj plenigas paghojn en Jarlibro de UEA: 109 ghis 124!!

Brazilo gastigis UK-n en 2002 , mi partoprenis. Mi vizitis Rio kaj Salvador antau UK.

Pro tio:

Mi demandas al mi, kio okazas kadre de la sekcio.
Mi arde deziras, ke la sekcio respegulu la abundan kaj valoran agadon pri Eo-instruado en via lando.

Kion fari?

Mi petas vin diskuti inter vi  kaj trovi solvojn.

Mi audis pri problemoj, mi konas tiajn situaciojn, ili estas kvazau en chiuj movadoj.
Via situacio ne malsimilas kun la situacio en aliaj landoj.
eble iom, char renkontighoj ne facilas pro la grandeco de la shtato.
ni devas superi tiujn problemojn.

Unue: (tio estas laustatuta devo) minimume 5 brazilanoj devas membri en ILEI kaj pagi kotizojn.

Due: (same) ILEI bezonas kontaktpersonon, sekciestron. Tiu persono devas regule rilati kun ni.

bonvolu informi min baldau.

Kun elkoraj bondeziroj por la nova jaro, por nova starto de via sekcio.

Plej elkore

Mireille Grosjean
prez de ILEI

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Kara Mirejo,

iam la sekcio de ILEI en Brazilo estis tre forta. Mi ne scias kio okazis, ke ĝi ne plu fortas kiel antaŭe. Cetere, delonge mi ne membras en ILEI. Mi aliĝos kaj restos je la dispono de tiuj, kiuj nuntempe gvidas la sekcion. Cetere, kiuj estas la nunaj gvidantoj?

Elkore,

Fabrício Valle

Mir respondas:

teorie la sekciestro nun estas Leysester Miro, kiun mi persone konas kaj alte shatas.

Estas du aliaj tenoroj, Josias kaj  Paolo, se mi bone kaptas la situacion.

Dankon, ke vi reagis al alighos.

amike Mirejo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2015-01-04 12:49 GMT+01:00 Emilio <cid.emilio@gmail.com>:

Kara Mireille, kara Jose Roberto Tenorio (prezidanto de EASP)

Mi sbribas al vi ne pri ILEI, sed pri Juna Amiko.  La revuo estas bonega kaj utilega, char mankas en esperanto pliaj facilaj tekstoj.   Tamen, hodiau estas tre malfacile eldoni revuojn, char la sendokostoj estas altaj, kaj la homoj jam kutimighis al la rapideco de interreto, do emas atendi 4 monatoj por la alveno de revuo.  Mi kredas ke chiuj revuoj suferas tian krizo.

Se vi spertas tiun problemon ankau por Juna Amiko, mi volas rekomendi ke oni modernigu ghian retejon, kiu estas tre malnova.

Sed krei novan retejon ne estas facila taksto, kaj tial mi proponas partnerecon inter Juna Amiko kaj Facila Vento www.facila.org , kiu enhavas facilajn tekstojn, kontrolitajn per listo de la unuaj grupoj de BRO.   Tie vi povos afishi kelkajn tekstojn kaj reklamojn de Juna Amiko.

Mia pagho estas belega kaj moderna, sed ghi havas du problemojn.  Unue ghi havas gramatikajn erarojn, jam en la prezento, kaj en kelkaj artikoloj.  Due, estas ege malfacile verki facile, do mi ne ofte havas novajn tekstojn.

Se opinias ke la ideo estas interesa, mi povos shanghi la prezenton de la pagho, kaj forigi artikolojn, kiuj ne estas bonaj, por kongrui kun la bonegaj tekstoj de Juna Amiko.

Mi skribas kun kopio al Tenorjo, char ankau li interesighas pri facilaj legadoj.

amike

Emiljo CID

Karaj brazilanoj

koran dankon pro la respondo de Emilio, pro la laudoj al Juna AMiko.

lau mia supozo EASP estas e-o asoc de San Paolo.

Jes, nia Komitato decidis, ke ankau Juna Amiko iam iel devas aperi tute au parte sur la reto.
pro tio mi plusendas vian proponon al la estraro kaj al la redaktoro.

Ni restu en kontakto.

mi vizitos vian retejon.

amike
Mirejo
el Lomeo, Togolando

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## DR KONGO

2015-04-13 Viktor Lufimpu skribas :

Karaj
Kiel sekciestro de ILEI,mi petis al la estraro de ILEI,ke Jean Bosco Malanda daurigu
mian taskon,tial agnoskita che la sekretario de ILEI,mi proponas ke oni faru AMO-n
pere de ILEI.
Se Jean Bosco Malanda konsentas,do li povas diskonigi la novajhon.

Victor Lufimpu

Mirejo aldonas :
Mi vidis Viktor okaze de UK 2015 kaj abunde parolis kun li. Li nun vivas en Parizo.

Xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

2015-07-10

Jean-Bosco Malanda anoncas :

Estimata sinjorino,

Dum la lasta ghenerala asembleo, Dkea elektis sekciestron de Ilei-KongoD.R., en la personon de sinjoro Mafuila Mavomo Jackson. Kaj, kvankam vi parolis pri alia persono, la membroj de Dkea tute ne konsentis flankenighi de sia prefero,al sinjoro Mafuila Mavomo.

Do, la jhus okazinta AMO-SEMINARIO 13 en Kinshaso kiun ni preparis kun li kaj kelkaj aliaj aktivuloj dum prepara komisiono, ne kontesteble konsekris lin. La raporto pri la seminario, preskaù preta chion detale rankontos al vi kun fotoj apoge.

Fakte,ankaù mi konscias pri la justeco de tia elekto.
Lia komitato konsistas el :
1.Mafuila Mavomo, sekciestro,
2.S-ino Alexandrine Omba, vicsekciestro
3.Didier Kuyindama Kuhana, sekretario
4.Konsilantoj (el inter la membroj) : Mata Matumona, F-ino Blessing Pelo Kevani, Arlain Kizeyidioko, JP Basilua,
Tial mi certas ke liajn raportojn vi bonvolos konsideri justaj

Sincerajn salutojn.

Xxxxxxxxxx

Kinshaso, la 6an de aùg. 2015

**RAPORTO DE LA KUNSIDO**

**Tagordo :**

1) Listigo de la e-instruantaro
2) Pri la nova mondskala sekretario de ILEI
3) La Ekstarigo de laborkalendaro
4) Diversaĵoj

**1) Listigo de la e-instruantaro**

**Instruistoj laŭfame :**

| N° | Nomoj | | Provinco |
|---|---|---|---|
| 1 | Sro | Rodan Mafuila | Kinshaso |
| 2 | Sro | Diwa | Kinshaso |
| 3 | Sro | Trésor Mbodia | Kinshaso |
| 4 | F-ino | Rosette Madiata | Kinshaso |
| 5 | Sro | Jery Mbemba | Kinshaso |
| 6 | Sro | Eddy Onan | Kinshaso |
| 7 | Sro | Martin Lofemba | Kinshaso |
| 8 | S-ino | Alexandrine Omba | Kinshaso |
| 9 | Sro | Jackson Mafuila | Kinshaso |
| 10 | F-ino | Eulalie Balakaji | Kinshaso |
| 11 | Sro | JP Lungikisa | Kinshaso |
| 12 | Sro | Lazard Bawam | Kinshaso |
| 13 | F-ino | Hope Mboyo | Kinshaso |
| 14 | Sro | Merlin Nzinga | Kinshaso |
| 15 | Sro | Didier Kuyindama | Kinshaso |
| 16 | Sro | Jean Bosco Malanda | Kinshaso |
| 17 | F-ino | Pascaline Kizodisa | Kinshaso |
| 18 | Sro | Kiangebeni | Kinshaso |
| 19 | Sro | Mazangu | Kinshaso |
| 20 | Sro | Flaubert Batangu | Kinshaso |
| 21 | Sro | Arlain Kizeyidioko | Kinshaso |
| 22 | S-ino | Christivie Ngongo | Kinshaso |
| 23 | S-ino | Lily Kandolo | Kinshaso |
| 24 | Sro | Landu Luyala | Kongo Central |
| 25 | Sro | Eddy Sava | Kongo Central |
| 26 | Sro | Mata Raymond | Kongo Central |
| 27 | Sro | Jacques Yende | Kongo Central |
| 28 | Sro | Dana Munshet | Kongo Central |
| 29 | Sro | Ngoma Jérémie | Kongo Central |
| 30 | Sro | Adriana Nanilumpovela | Kongo Central |
| 31 | Sro | Nsita Vumi | Kongo Central |
| 32 | Sro | Mayombe Nzilamosi | Kongo Central |
| 33 | Sro | Matezo Nsukambote | Kongo Central |
| 34 | Sro | Mampanga Mpasikamani | Kongo Central |
| 35 | Sro | Ntoto Zola | Kongo Central |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 36 | Sro | Nsiangani Yuku | Kongo Central |
| 37 | Sro | JP. Basilua | Kongo Central |
| 38 | Sro | Roger Mambueni Mbunga | Kongo Central |
| 39 | Sro | Roger Luzayamo | Kongo Central |
| 40 | Sro | Nlandu Utubanzila | Kongo Central |
| 41 | Sro | Bena kanda | Kongo Central |
| 42 | Sro | Jérémie Kapunu | Orienta |
| 43 | Sro | Dankon Kwibe | Orienta |
| | S-ino | Charline Tumusifu | Orienta |
| | Sro | Honoré Seburo | Orienta |
| | Sro | Mathieu Diemo | Orienta |
| | S-ino | Rachelle Katchoko | Bandundu |

N.B : Pri ĉi ĉiuj, esplora Ilei-komisiono estas starigota.

**2) Pri la nova mondskala sekretario de ILEI**

Ni, ILEI sekcio de RD Kongo prezentas niajn komunajn kaj sincerajn gratulojn al Sro. Emile Malanda la nova Sekretario de ILEI.

**3) La Ekstarigo de laborkalendaro**

La kunvenoj okazos dufoje ĉiumonate provizore la unuan kaj la trian ĵaŭdon je la 14 :00. Antaŭvidi kontaktojn kun la geinstruistoj.

**4) Diversaĵoj**

La venonta kunsido okazos la 20a de Aŭgusto

***Ĉeestis la kunsidon :***

Sro. Mafuila Mavomo Jackson : Sekciestro
S-ino Alexandrine Omba : Vicsekciestro
Sro Didier Kuyindama Kuhana : Sekretario

Raportis
**Didier Kuyindama Kuhana**
Sekretario de Ilei Sekcio

Aprobis
**Jackson Mafuila Mavomo**
Ilei-Sekciestro

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## FINNLANDO

**Informoj al ILEI, elektoj**

La finna sekcio Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj havis sian jarkunsidon 7.3.2015.

La kunsido kaj poste la estraro inter si elektis jene:

sekciestro 2015-2017 kaj prezidanto Sylvia Hämäläinen

vicprezidanto Raita Pyhälä

sekretario Tapani Aarne

kasisto Paula Niinikorpi

komitatanoj 2015-2017

Sylvia Hämäläinen

Paula Niinikorpi

paula.niinikorpi@gmail.com

Rusthollintie 6 as. 10

FI-28430 Pori

XXXXXXX

Bonvolu legi la aldonitajn konsilojn pri plenskribo. Limdato por raporti: Mar 31, 2015.

**Nomo kaj mallongigo en Esperanto:**

Esperanto-Ligo de Finnlandaj Esperantistoj, ELFI

**Nomo kaj mallongigo nacilingve:**

_______________________________________________ x sama kiel pasintjare

**Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:**

________ / ________ x sama kiel pasintjare

**Jura statuso:**

________________________________________________ x sama kiel pasintjare

Se la sekcio havas juran registriĝon, bv. doni la lokon, instancon kaj daton de tiu registriĝo.

**Rilato kun Landa Asocio de UEA:**

________________________________________________ x sama kiel pasintjare

Ekz.: ĉu integra parto, en kunlaboraj rilatoj aŭ plene sendependa de ĝi?

**Membro-nombro fine de 2015:**

Sume: 21, Detale: paperaj 7, retaj 14, aliaj (HM,DM) - .

Bv. informi nin se vi havas enlandajn membrojn, kiuj ne apartenas al ILEI-internacia.
*Estas 1*

**Nombro da rajtigitaj komitatanoj por 2015: 2.**

(kalkulu laŭ membronombro fine de 2015: 5-14: **1**; 15-34: **2**, 35-49: **3**, pli ol 50: **4**.)

**Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:**

Oficiala hejmpaĝo: [www.esperanto.fi/elfi](www.esperanto.fi/elfi) Oficiala ret-adreso: sylvia.h@kolumbus.fi

Ĉe la retadreso bv. diri al kiu funkciulo ĝi indikas. Se vi havas retejon, kiu prizorgas ĝin, kiomofte vi ĝisdatigas ĝin, kiujn planojn vi havas ampleksigi ĝin? Se ne, ĉu vi planas lanĉi retejon? Ĉu vi farus tion, se vi havus teknikan helpon de ILEI aŭ pere de ILEI?
*La retadreso estas tiu de la sekciestro. La retejon prizorgas Tapani AARNE, la sekretario. Li ĝisdatigas ĝin ofte dum la jaro.*

Ĉu via sekcio havas retgrupon: ne

Se jes, ĉu vi pretas permesi al la internacia ILEI dissendi rekte mesaĝojn al viaj membroj? JES / NE
Se ne, kiel vi plusendas al viaj membroj mesaĝojn de ILEI?

**Revuo sekcia:**

________________________________________________ x sama kiel pasintjare

Se via sekcio eldonas fizike presatan aŭ retan bultenon, bv. doni ĝian nomon, redaktoron, retadreson, oftecon kaj amplekson.

**Enlanda membrokotizo:**

6 €
Se la enlanda kotizo estas pli ol la internacia, bv. indiki kiun parton vi retenas por landa agado.

**Nuna estraro de la sekcio:**

Sylvia Hämäläinen, sekciestro, sylvia.h@kolumbus.fi ĝis marto 2019
Raita Pyhälä, vica sekciestro, raita.pyhala@gmail.com ĝis marto 2015
Tapani Aarne, sekretario, tapani.aarne@mbnet.fi ĝis marto 2016
Paula Niinikorpi, kasisto, paula.niinikorpi@gmail.com ĝis marto 2016
Tuomo Grundström, membro, tuomo.grundstrom@gmail.com ĝis marto 2015
☐ sama kiel pasintjare
Laŭeble aldonu retadresojn, adresojn kaj funkciojn.

**Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:**

*rigardu supre* ☐ sama kiel pasintjare

=== ***Agado*** ===

6 ĝis 10 linioj da klarigoj bonvenas; ligoj al pli longaj raportoj bonvenas.

**Propraj aranĝoj dum 2015:**

**-**

**Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:**

*Somera kurso de EAF, landa asocio*

**Propraj projektoj dum 2015:**

-

**Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:**

-

**Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:**

*Raita Pyhälä estis intervjuata en la ĉefa taga gazeto en la lando. Tuomo Grundström prezentis en biblioteko sian tradukon de la libro Doktoro Zamenhof.*

**Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:**

-
Plie: ĉu vi sukcesis altiri eksterajn subvenciojn por viaj projektoj?

**Konata E-instruado en via teritorio:**

*du studrondoj en laborista instituto en Turku, po unu studrondo en Hämeenlinna, Tampere kaj universitato de Helsinki. Mi ne memoras ĉu ili estis menciitaj en edukado.net.*

Aliaj atingoj en 2015
-

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

# GERMANIO

Bonvolu legi la aldonitajn konsilojn pri plenskribo. Limdato por raporti: Mar 31, 2016.
Nomo kaj mallongigo en Esperanto:
Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj / AGEI
Nomo kaj mallongigo nacilingve:
x
sama kiel pasintjare
Jaro de fondo / Jaro de aligo al ILEI:
/ x
sama kiel pasintjare
Jura statuso:
x
sama kiel pasintjare
Se la sekcio havas juran registrigon, bv. doni la lokon, instancon kaj daton de tiu registrigo.
Rilato kun Landa Asocio de UEA:
x
sama kiel pasintjare
Ekz.: cu integra parto, en kunlaboraj rilatoj au plene sendependa de gi?
Membro-nombro fine de 2015:

Sume: _75+3_. Detale: paperaj _68_ retaj _10 _ aliaj (HM,DM) _1 DM + 3 familiaj membroj.
Bv. informi nin se vi havas enlandajn membrojn, kiuj ne apartenas al ILEI-internacia.
6 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrokotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI, do la landa listo enhavas 78 membrojn.
Nombro da rajtigitaj / nomumitaj komitatanoj por 2014:
4 . Per aparta deklarilo vi nomumu ilin!
(kalkulu lau membronombro fine de 2012: 5-14: 1; 15-34: 2, 35-49: 3, pli ol 50: 4.)
Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:
Oficiala hejmpago: http://esperanto.de/agei
Oficiala ret-adreso: zsofia.korody@esperanto.de
Ce la retadreso bv. diri al kiu funkciulo gi indikas. Se vi havas retejon,

kiu prizorgas gin:
Zsófia Kóródy
kiomofte vi gisdatigas gin:
lau bezono, se estas gravaj novajoj au gravaj sangoj
kiujn planojn vi havas ampleksigi gin?
Se ne, cu vi planas lanci retejon? Cu vi farus tion, se vi havus teknikan helpon de au pere de ILEI?
Cu via sekcio havas retgrupon: jes
Se jes, cu vi pretas permesi al la internacia ILEI dissendi rekte mesagojn al viaj membroj? ne
Se ne, kiel vi plusendas al viaj membroj mesagojn de ILEI?
prezidanto de AGEI, Zsófia Kóródy plusendas mesagojn al la listo

evuo sekcia: x
sama kiel pasintjare
Se via sekcio eldonas fizike presatan au retan bultenon, bv. doni gian nomon, redaktoron, retadreson, oftecon kaj amplekson.
Enlanda membrokotizo:
25 EUR, pro la altigita ILEI-kotizo ekde 2012 restas 5 EUR/membro por landa agado
Se la
enlanda kotizo estas pli ol la internacia, bv. indiki kiun parton vi retenas por landa agado.
Nuna estraro de la sekcio:
Zsófia Kóródy (prezidanto), Dr. Rudolf Fischer (vicprezidanto), Christof Krick (kasisto), Karin Klose (turfalkino@gmx.de)
Laueble aldonu retadresojn, adresojn kaj funkciojn.
Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:
elektoj okazis en junio 2014, tiam pro demisio de estrarano Harald Schmitz, nova estrarano, Karin Klose estis elektita. Sekva elekto: majo 2016, nova estrarano estas sercata anstatau Karin Klose.
La mandato de la komitatanoj dauros gis marto 2018, daurigo de la mandatoj estis akceptita de la jarcefkunveno la 23an de majo 2015.
===
Agado
===
AGEI estas komunutila asocio, agadas por interkomprenigo de popoloj, eduko al paco kaj toleremo. La asocio helpas la lernejan kaj universitatan instruadon de Esperanto, proponas internaciajn amikajn kontaktojn inter lernantoj de Esperanto, instigas al internacia intersango de lernantoj, zorgas pri trejnado de Esperanto-instruistoj, ellaboras kaj disvastigas esperantajn instru- kaj ekzamenmaterialojn, rekomendas lingvajn ekzamenojn ankau lau internaciaj normoj, kunlaboras kun similaj internaciaj fakorganizajoj, estas alparolpartnero por la ministerio pri edukado rilate al Esperanto-instruado.
AGEI organizas fakajn kunvenojn, instigas al verkado de fakaj artikoloj kaj fakliteraturo, donas fakajn servojn al siaj membroj.

Gravas ankau la konsultado pri instruagado, metodika-didaktika helpo al gekolegoj, spertintersango pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado.

Propraj arangoj dum 2015:
Du gravaj instrurilataj eventoj okazis en 2015.

1. la organizado de Intensa Tutsemajna Kurso kun metodika trejnado (Bildungsurlaub) en Herzberg am Harz ce Interkultura Centro Herzberg.
Informoj:
http://agei.esperanto-urbo.de/gallery.php?gid=31650776 Temis pri 1-semajna intensa perfektiga lingvokurso kun faka kaj metodika trejnado inter 9-13 marto 2014. La celo estis doni al la kursanoj plenan mergigeblon en Esperanto-lernadon, helpi al tiuj, kiuj preferas en mallonga tempo pli profunde ellerni la lingvon dedicante 1-semajnan periodon al intensa okupigo pri Esperanto, al tuttaga praktika uzado de la lernitajoj, interkomprenigante unu kun la aliaj en la lernita cellingvo.
Partoprenantoj venis ankau el Danlando, kie ili ricevis europan subvencion por klerigo. Tiel ili estis oficiale senditaj de Dana Esperanto-Asocio por tiu intensa trejnado.
La instruado okazis sub gvido de spertaj instruistoj, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar, kiuj aldonis al la lingvaj-gramatikaj klarigoj ankau metodikajn konsilojn: kiel plej bone, plej efike prezenti kaj ekzercigi iun lingvan fenomenon. Kompreneble lernado el propa bezono, per propraj ekzemploj tre gravas kaj utilas.
Ni spertis, ke la kursanoj tre bone eluzis la tempon ec post la oficialaj lernhoroj por persona kapabloevoluigado dum la semajno: ili utiligis la cemane haveblajn instrumaterialojn kaj pedagogiajn-metodikajn fakverkojn, kiuj estas je dispono sur la bretaro de Interkultura Centro Herzberg.
Al la programo aldonigis kulturaj kaj turismaj eventoj.
La lernado dum la dua semajno ampleksigis per auskultado de fakprelegoj pri gramatiko, literaturo, Esperanto-movado, historio kaj faka analizado, traktado de generale bone uzataj metodoj, spertintersango pri Esperanto- instruado kaj generale pri lingvoinstruado. Gravis ankau rakontado, informado pri kulturaj eventoj, interesajoj, sciindajoj el la Esperantomovado.

2. **TORPEDo 10** (septembro 29 - oktobro 4. 2015 ) la Tradicia Oktobra Renkontiĝo PEDagogia (samtempe 70a studsesio) okazis en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, organizita de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo kaj AGEI, Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. Ĝi fariĝis denove internacia pro partopreno de kursanoj el Danlando, kiuj venis por trejnado enkadre de Erasmus+ projekto. Multaj metodoj estis traktitaj, analizitaj. La partoprenintoj povis studadi multajn lernolibrojn kaj didaktikajn helpmaterialojn el la riĉa kolektaĵo de la biblioteko de Interkultura Centro Herzberg. Zsófia Kóródy prezentis plurajn memfaritajn instruhelpilojn, montris praktikajn ekzemplojn por utile uzi ilin kaj donis taskojn al la kursanoj. Peter Zilvar prelegis pri Esperanto-literaturo kaj movadaj temoj, okazis ankaŭ vigla spertinterŝanĝo kaj diskutado pri kursoj, lecionoj al diversaĝaj kursanoj.
Estis tuŝita ankaŭ aktuala temo: instruado per moderna teknologio, ja instruistoj devas respondi al la demandoj: ĉu niaj instrumetodoj kapablas sekvi la rapidan teknikan evoluon en la mondo? Ĉu ni povas reagi al la ŝanĝoj kaj bone utiligi novajn teknikilojn por Esperanto-instruado? Ĉu ni scias sufiĉe pri la novaj medioj, aparatoj, realaj kaj virtualaj eblecoj?
Okazis prelegoj, diskutado, spertinterŝanĝo, praktika konsilado.

**Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:**

Dum la 92a Germana Esperanto-Kongreso en Hameln AGEI havis sian jarĉefkunvenon. Inter aliaj temis pri raporto pri la t.n. studsesioj, kapabligado kaj pluklerigado de instruistoj, kiun realigas Germana Esperanto-Centro en kunlaboro kun AGEI en Herzberg am Harz, pri ĝemelurbaj agadoj de instruistoj kaj lernejanoj kaj pri internaciaj projektoj.

Trejnsesio kun partopreno de diversnivelaj lingvolernantoj estis organizita dum la 37-a Bavelo-seminario de la Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo (BAVELO) **16 - 18. oktobro** 2015 en Pforzheim, Germanio.La internacia aŭtuna renkontiĝo en sudokcidenta Germanio ĉi-foje ofertis specialan trejnadon por instruemuloj.

Ĉiuj eventoj, la tuta kunlaboro estis tre interesaj kaj instruaj, donis eblon al spertiĝo kaj kontaktado kun samfakuloj.

En 2015 reprezentantoj de AGEI partoprenis en la ILEI-konferenco en Ostende,

Belgio kaj ĉeestis ankaŭ edukajn eventojn dum la 100-a Universala Kongreso en Lille, Francio.

**Propraj projektoj dum 2015:**

Laŭ nova iniciato kun Interkultura Centro Herzberg (sub gvido de Peter Zilvar) ekestis kontaktoj kun la t.n. Landa Plenkreskula Kleriginstitucio (Ländliche Erwachsenenbildung, LEB). Post subskribo de kontrakto realiĝis tutjara kurs- kaj klerigprogramo kun variaj temoj, prelegoj, prezentadoj, organizado de t.n. Interkulturaj Vesperoj. La agnosko estas grava atingaĵo, kiu ebligas montri la kulturperantan, edukan rolon de la internacia lingvo Esperanto.

**Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:**

Dum 2015 okazis trejnado de AGEI-membroj en kelkaj internaciaj renkontiĝoj kadre de la Grundtvig-projekto 'Kultura diverseco kaj multlingvismo en Eŭropo – kiel lerni pri tio?'
Detaloj pri la projekto: http://kulturdiverseco.esperanto-urbo.de/ en Esperanto, en la germana, hungara, pola kaj parte en la angla lingvoj.
La laborplano por 2015 enhavis la sekvajn kunvenojn, trejnsesiojn:

- majo: artprezentadoj de la projektpartneroj dum la Pentekosta Festivalo en Germanio – Pentekosto en Herzberg, tradicia popolfestivalo kun dancoj kaj muziko
- junio: pretigo de filmo pri la serio de projektagadoj – renkontiĝoj kun diversaj kulturoj en ĉiuj partnerlandoj, interŝanĝo de artgrupoj, seminarioj kaj prezentadoj, intervjuoj kun partoprenantoj
  kaj: pretigo de DVD montranta la uzadon de interkulturaj temoj en edukprogamoj surbaze de la projektspertoj, analizo de enketrezultoj kaj postseminariaj materialoj, konkludoj kaj rekomendoj, en Esperanto kaj en naciaj lingvoj
  kaj: eldono de broŝuro kun la resumo de instrumetodoj por akceptado de aliaj kulturoj kaj konservado de propra identeco, tradukita al la lingvoj de la partneroj, montrante, kiel atingi la junularon kun tiu temo
  kaj: albumo kun enkonduko pri multlingveco kaj kultura diverseco de eŭropaj popoloj kaj kun ekzemploj de kulturaj eventoj en la partneraj landoj

En EU-projekto partoprenis ankaŭ plenkreskuloj, gekolegoj: ekz. en Grundtvig-projekto, kiu komenciĝis en aŭtuno 2013 kun partopreno de Germana Esperanto-Centro (sub gvido de Peter Zilvar), Fondaĵo edukado.net el Nederlando, Centro de Interkultura Edukado el Pollando kaj Kultura Esperanto-Asocio el Hungario. La preparlaboroj estis sukcese plenumitaj en 2013, partneraj renkontiĝoj okazis en Pollando, en Nederlando kaj en Hungario en 2014. La projekto finiĝos en somero 2015.
Detaloj, laborplano, raportoj, albumoj, ktp. ĉe http://kulturdiverseco.esperanto-urbo.de

**Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:**

Bona varbado estas la anoncoj pri Esperanto-kursoj en la programkajeroj de Popolaltlernejoj (VHS). Tiuj atingas dek-, eĉ centmilojn da legantoj, familiojn, vastan publikon. Eĉ se poste ne realiĝos kurso pro manko de sufiĉaj partoprenantoj, la legantoj povas legi pri Esperanto kaj ekscii pri uzebloj de la lingvo.

Varbado Esperantlingva kaj germanlingva okazas per la gazeto de GEA Esperanto aktuell, tra naciaj kaj internaciaj dissendolistoj, per retpaĝoj, Facebook kaj alvokoj por membriĝo kaj ekz. dum grandaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj enlandaj, dum studsesioj aranĝataj en



Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg http://ic-herzberg.de.

ILEI preparis nacilingvajn varbilojn, ekz. por la reprezentiĝo en kunsidoj de UNESCO. La germanlingva traduko estas pretigita, estas je dispono por interesiĝantoj ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652
AGEI pripensas ĝian paperan eldonon.

**Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:**

AGEI regule kunlaboras pere de pluraj siaj instruistoj kun popolaltlernejoj (VHS).
En kelkaj urboj ankaŭ en 2015 aperis anoncoj pri Esperanto-lingvokursoj.
AGEI subtenas gekolegojn per kolektado kaj modelcela aperigo de varbtekstoj por tiuj kajeroj ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652

**Konata E-instruado en via teritorio:**

Laŭ ricevitaj informoj lerneja instruado okazis en Herzberg am Harz, Winterberg, Buxtehude kaj Kassel. AGEI ne mem listigas la kursojn, sed alvokas ĉiujn gekolegojn de bazaj kaj mezgradaj lernejoj, plenkreskulaj kursoj kaj studrondoj en universitatoj registri siajn kursojn kaj detalojn pri la instruado ĉe http://edukado.net.

Granda sukceso en universitatnivela edukado estas la lernogrupoj en Universitato Emden, kie en ĉiu semestro sub gvido de Sebastian Kirf dekoj da studentoj konatiĝas kun Esperanto kaj pluraj el ili elektas ankaŭ la sekvasemestran daŭrigan fazon.

Ankaŭ en Stuttgart kaj Wiesbaden okazadas universitataj Esperanto-kursoj gvidataj de Johannes Mueller kaj Martin Ptasinski.

**Aliaj atingoj en 2015**

Bona atingo en 2015 estis la regula informado de nia membraro, kaj la relative stabila membronombro de nia asocio.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

## KROATIO

KEU

Estimata prezidantino de ILEI,

pro necesa sxangxo de la komputilo kiu paneis, kaj en kiu restis pluraj mesagxoj, mi ne certas cxu mi respondis al Via peto pri la statuto.

Mi povas informi Vin, ke Kroata E-Unuigxo al kiu estas ligita nia sekcio pretigas novan statuton. Post gxia akcepto cxiuj sekcioj refaros siajn regularojn. Post fino de tiu proceso, ni tradukos la regularon al E-o, kaj sendos al Vi.

Mi deziras al Vi kaj aliaj partoprenantoj sukcesan konferencon.

Svijetlana Akik,
sekciestro de LS de ILEI/KEU

2015-07-15

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

## NEPALO

**Jara raporto de ILEI Nepalo**

**bharat ghimire** 10 janv. (Il y a 1 jour)

À ilei-estraro-p., hori, Subas, Mukundaraj, Janardan, esploristo, moi, luno1962, fumio, Novraj, Reanto

Kara Mirejo,
Mi estas iom okupita en miaj laboroj, do pardonu min pro la malfrua raporto. Jen mi raportas pri la agado de Pasinta jaro,2014.

1. NEspA organizis Specialan renkontiĝon 6a-17a marto. Cirkaŭ 45 eksterlandaj kaj enlandaj esperantistoj partoprenis tutan programon. Nepala Sekcio de ILEI organizis prelegojn en diversaj temoj dum la tiu periodo. Okazis 16 prelegoj en diversaj temoj. Intertempe ni survoje al diversaj eskruslokoj propagandis nian lingvon.

2. Mi kaj mia kolego s-ro Janardan Upreti partoprenis 2-a Sud-azia Seminario en Lahoro, Pakistano( 20-24 Februaro). Mi nome de ILEI prelegis en la tempo "Kial esperanto en Sud-aziaj landoj?" en Panjaba Universitato. Ĉeestantoj estis geprofesoroj kaj gestudentoj de la esplorado. Kaj poste ni faris prelegon en diversaj lernejoj.

3. Ni organizis diversajn prelegojn en nia asocio rilate al esperanto instruado ĝis Majo. En fino de Junio, ni organizis esperantan kurson en Esperanto-Domo en Thamelo kaj ĝi kontribuis pli grandigi la nombron de Esperantistoj en nia loko.

4. En Junio kaj Auxgusto, Prezidanto de NEspA Indu Devi Thapaliya kaj mi partoprenis ILEI konferencon en Montevideo kaj 99a UK en Bona Aero. Ni disdonis informilojn survoje en Montevido, Bona Aero kaj Rosario skribita en Hispana lingvo kaj ni faris saman dum nia vojaĝo al Brazilo( ĉi foje ni disdonis foliojn skribtan en Portulala lingvo). Indu faris plej parte ĉiam sur la strato.

5. Mi mem vojaĝis orienta parto de Nepalo en Oktboro, ĉirkaŭ tri Semajnoj kaj instruis esperanton en Itahari, Surunga kaj Birtamod sed ne por novuloj sed por tiuj kiuj jam eklernis nian lingvon. Mi instruis al eternaj komencantoj.

6. En pasinta Novembro, ILEI Sekcio de Nepalo organizis Specialan Unu Montana Kurson. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 kaj en la fina programo 18 restis. Ili ricevos atenston de la mano de S-ro Hori Yasuo kiu planas viziti nepalon por partopreni 11a hiamalaja renkontiĝo venonta februaro-marto.

7. Mi faris prelegojn pri nia lingvo kaj instruis bazan esperanton en diversaj kolegioj laŭ la peto de la direktoroj. Fakte mi ne intencis fari tion sed ili mem petis fari tion. Mi faris preleon en Pentagon International collage, Premier collage kaj Nepal college of Travel and Tourism( Mirejo faris prelegon tie kiam ŝi vizitis Nepalon)

8. Ni organizis prelegon de eksterlandaj gastoj en tuta jaro. La grava prelego estis de Monike el Franĉio en pastia oktobro.

9. S-ino Indu kaj Kaj Pridip Ghimire aperigas diversajn artikolojn en nepalaj gazetoj kaj interrete pri nia lingvo.

2014 estis pli sukcesa jaro por nia movado ol 2013. Do, ni estas kontentaj. Mi elkore dankas al D-ro Mukunda Raj Pathik kaj LP Agnihotry por la daŭra subteno.

Mi deziras al vi kaj al ĉiuj fleĉan novajaron.

Kore
Bharat Kumar Ghimire

Nova raporto de Bharat

2015-04-25 sama tago kiel la tertremo

Estimataj gesinjoroj Stefan kaj Mirejo,

***NEspA***,kun granda tumulto ekde ĝia ekzisto pasigis 25 jarojn kaj ni celebras nun la arĝentan jubileon kun diversaj programeroj.Ĉi jara programo komencis per historia 11-a Himalaja Renkontiĝo, kiu okazis ekde 28a februaro-9a Marto,2015. Kun granda plezuro,NEspA bonvenigis multajn eksterlandajn gastojn okaze de 11a Renkontiĝo. Ni atingis ĝis la 3200 mil metrojn (Pun Hill) kaj kantis Esperantan himnon sub la flago de nia lingvo. Ni planas celebri okaze de la Jubilea Jaro diversajn programerojn laŭeble la tutan jaron. Ni nur ne intencas fari la agadojn en Nepalo sed ni ĉi jare atingos ĝis Bangladeŝo kaj Ŝrilanko ĝis la fino de ĉi tiu jaro,

Jen kelkaj mensiindaj laboroj en 2014/15

1.Nepala Esperanto Asocio organizis Specialan renkontiĝon 6a-17a marto,2014. Ĉirkaŭ 45 eksterlandaj kaj enlandaj esperantistoj partoprenis tutan programon. Ni organizis prelegojn en diversaj temoj dum la tiu periodo.Okazis 16 prelegoj en diversaj temoj. Intertempe ni survoje al diversaj eskruslokoj propagandis nian lingvon.

2.S-orj Bharat Ghimire kaj Janardan Upreti partoprenis 2-an Sud-azian Seminarion en Lahoro, Pakistano(20-24 Februaro).Ni nome de NEspA prelegis en la temo "Kial esperanto en Sud-aziaj landoj?" en Panjaba Universitato. Ĉeestantoj estis geprofesoroj kaj gestudentoj de la esplorado. Kaj poste ni faris prelegon en diversaj lernejoj.

3.Ni organizis diversajn prelegojn en nia asocio rilate al esperanto instruado ĝis Majo,2014.En fino de Junio, ni organizis esperantan kurson en Esperanto-Domo en Thamelo kaj ĝi kontribuis pli grandigi la nombron de Esperantistoj en nia loko.

4.En Junio kaj Aŭgusto, Prezidanto de NEspA Indu Devi Thapaliya kaj Bharat Ghimire partoprenis ILEI konferencon en Montevideo kaj 99an UKn en Bona Aero.Ni disdonis informilojn survoje en Montevido,Bona Aero kaj Rosario skribitan en Hispana lingvo kaj ni faris saman dum nia vojaĝo en Brazilo(ĉi foje ni disdonis foliojn skribtan en Portugala lingvo).Indu faris plej parte ĉiam sur la strato.

5.Bharat Ghimire vojaĝis orientan parton de Nepalo en Oktboro,ĉirkaŭ tri Semajnoj kaj instruis esperanton en Itahari, Surunga kaj Birtamod sed ne por novuloj sed por tiuj kiuj jam eklernis nian lingvon.

6.En pasinta Novembro, NEspA organizis Specialan Unu Montana Kurson. Ĉeestis ĉirkaŭ 30 kaj en la fina program 18 restis. Ili ricevis atenston de la mano de S-ro Hori Yasuo kiu vizitis nepalon por partopreni 11an hiamalajan renkontiĝon en februaro- marto.(2015)

7.Bharat Ghimire faris prelegojn pri nia lingvo kaj instruis bazan esperanton en diversaj kolegioj. (Tio estis nur enkonduka kurso)

8.Ni organizis prelegon de eksterlandaj gastoj en la tuta jaro.La grava prelego estis de Monike el Francio en pastia oktobro.

9. S-ino Indu kaj Pridip Ghimire aperigas diversajn artikolojn en nepalaj gazetoj kaj en revuo Esperanto kaj pli multe interrete pri nia lingvo. S-rino Indu ĝus aperigis gravan artikolon en fama magazino nepallingve.

10. Ni organizis 11an Himalajan Renkontiĝon en 26a Februaro ĝis 9a marto,2015. Ĉeestantoj estis 42 geesperantistoj el diversaj landoj. Ni atingis ĝis 3200 metrojn alteĉo kaj kantis esperantan himnon.

11. Kutimaj programoj semajna kunveno, piknikoj, kursogvidado kaj intersanĝo de bondezirmesaĝoj dum Nepala festo kaj zamenhofa tagfesto okazis kiel kutime kaj ne bezonas mensii en la raporto.

Mi deziras vian kunlaboradon en venontaj tagoj.

**Bharat Kumar Ghimire**

**Ĝenerala Sekretario**

**XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX**

## UKRAINIO

***Ukrainia sekcio de ILEI***

Estimata Prezidantino de ILEI!

Mi estas profesorino kaj estro de la katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko de Orienteuropa nacia universitato nome de Lesja Ukrainka en urbo Lucjk, Ukrainio. Mi estris la ukrainian sekcion de ILEI ek de la 2000 j., kiam ghi estis fondita, ghis la 2009 j. Ni kun komitatanoj faris multon por oficialigi E-n en mezlernejoj, gimnazioj kaj universitatoj. Ekzemple, mi estas la autoro de la programo por fakultativa E-kurso en mezlernejoj kaj gimnazioj, rekomendita de Ministerio pri klerigo kaj scienco de Ukrainio (2001 j.). Krome mi preparis 3 programojn por specialaj kursoj en universitato, kie mi laboras/ 2 kursoj - «Chefaj aspektoj de interlingvistiko» kaj «E en aspekto de interlingvistiko» jam estas konstantaj en la universitata plano dum 3 studjaroj. Fakte, la fondigho de la unika en Ukrainio katedro pri romanidaj lingvoj kaj interlingvistiko ankau estis iniciita de mi.

Dum ILEI-konferencoj en Bratislava, Kaunas, Parma, Krakovo mi prelegis kaj partoprenis lingvajn festivalojn. Chi-jare mi planas partopreni UK-on en Lille kaj mi esperas, ke

ni kun nia prezidanto de UkrEA Eugeno Kovtonjuk trovos eblecon priparoli kun vi la situacion en ukrainia sekcio de ILEI.

Mallonge mi povas diri, ke Vilodimir Hordijenko, kiu estis prezidanto de UkrEA

kaj estro de ukrainia ILEI-sekcio ek de 2009 j. konstante agis kontrauleghe, perdis chiujn dokumentojn, kiujn mi transdonis al li koncerne al nia sekcio, ne okupighis pri instru-metodika laboro k.t.p. Pri tio parte sciis kaj reagis eks-prezidantoj de ILEI Radojica Petrovic kaj Stefan MacGill. Nun ni strebas plibonigi la situacion, kreskigi novajn instruistojn, plialtigi kvanton kaj nivelon de E-kursojn en mezaj kaj altaj lernejoj, organizi en nia universitato E-centron> restarigi kontaktojn kun AIS...

(...)

Kun estimo kaj bondeziroj

Nina Danylyuk

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX